# DIA REGNO

• dumonata kristana revuo en esperanto • n-ro 5 (968) • 2024 •

DIA REGNO

ISSN 0167-9554



Kristana kongreso en Vác, Hungario

Partoprenantoj dum la vizito en la episkopa palaco.

**KELI**
**Kristana Esperantista Ligo Internacia**
**fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA**

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

**Prezidanto**: Philippe COUSSON
✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
✆ +33 (0) 549468021; 💻 philippe.cousson@sfr.fr

**Sekretario**: Pavel POLNICKÝ;
✉ Lidická 939/11,
CZ 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio
✆ +420 723 672 335;
💻 polnickypavel@seznam.cz

**Kasisto**: Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS
✉ Klauzál utca 32,
HU 1072 Budapest, Hungario
✆ +36 302 000 306;
💻 agnes@raczkevy-eotvos.com

**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. • Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de 'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale': CIC-banko, BIC: CMCIFRPP; IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon **www.chez.com/keli/**

---------------

DIA REGNO
**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908**
**dumonata revuo - ISSN 0167-9554**

**Redaktoro**: Bengt Olof ÅRADSSON
✉ Kungsgatan 13B; SE-281 54 Hässleholm; Svedio
✆ +46 70 2004574; 💻 dr_boarad@yahoo.se

**Kontrollegis**: Pavel POLNICKÝ

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

***Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.***

**Ekspedado:** Pavel POLNICKÝ
Vidu la adreson de la sekretario

**Presado:** Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio. 💻 info@astroprint.cz

**Eldonmonatoj:** meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec.

## Enhavo

| | |
|---|---|
| Vivi en paco en mondo sen paco | 99 |
| Kongresa raporto | 102 |
| Invito al KELI-kongreso 2025 | 108 |
| La sveda sanktulino Elisabeth | 112 |
| Invito al Bibliaj tagoj 2025 | 117 |
| Jam pasis 35 jaroj | 119 |
| Kanto: Kiel sian bebon mame nutras patrino | 120 |

## Redaktoraj vortoj

Kara leganto, mi bedaŭras ke iom malfrue venas la nuna numero de Dia Regno.

Finfine ni povas prezenti al vi informon kaj aliĝilon al la Kristana Kongreso 2025. Ĝi estos la 74a KELI-kongreso kaj ĝi okazos en Ĉeĥio. La Universala Kongreso de UEA ankaŭ okazos en Ĉeĥio, en Brno, sed la semajnon antaŭe. Do eblos partopreni en ambaŭ kongresoj.

En la nuna gazeto vi ankaŭ trovos la inviton al Bibliaj Tagoj 2025. Tiu evento okazos en marto, en Kaub ĉe l´ Rejno, Germanio.

Do, vi havos eblecon ĝui internacian kaj esperantan etoson plurloke sekvontjare kaj tie renkontiĝi kun (mal)novaj geamikoj.

En tiu ĉi numero vi ankaŭ trovas raporton de nia kongreso 2024, en Vác, Hungario. Tre bela okazaĵo kun riĉa kaj diverstipa enhavo. Dum unu semajno ni estis kune en familia kaj kristana etoso. Tiu raporto kun fotoj certe inspiros vin aliĝi al la kongreso 2025!

Mi deziras al vi interesan legadon!

# “Vivi en paco en mondo sen paco”

## Kristana kongreso de KELI en Vác, Hungario
## Dimanĉa Diservo, 4an de aŭgusto 2024

Philippe Cousson, FR

Psalmo 85,10–13:
Bono kaj vero renkontiĝas, *Justeco kaj paco sin kisas*.
Vero elkreskas el la tero, Kaj justeco rigardas el la ĉielo.
Kaj la Eternulo donos bonon, Kaj nia tero donos siajn produktojn.
Justeco iros antaŭ Li Kaj faros vojo por Liaj paŝoj.

Karaj gefratoj en Kristo, du tekstoj antaŭ ni, la unua estis elektita kiel moto de nia kongreso, kaj la duan mi trovis en broŝuro pri la paco.

Mi komencos mian meditadon per la dua. Mi ĉerpas la kernon el prediko de alzaca pastoro en broŝuro eldonita en 1982 kaj titolita “Vivi en paco en mondo sen paco”.

Estis ĝuste en tiu periodo kiam oni diris : “La misiloj estas en orienta Eŭropo kaj la pacifistoj en okcidenta”. Estis ankaŭ periodo de milito en Libano, kie judoj, kristanoj kaj islamanoj sin mortigis reciproke, plejofte en la nomo de la sama Dio. Kaj mi citas nur kelkajn faktojn tiutempajn. Ĉu ni ne devus pripensi ke okazis, ĉefe en Eŭropo, la du grandaj militoj de la dudeka jarcento, same homoj kiuj sin mortigis reciproke.

Poste venis ankoraŭ en Eŭropo militoj en Jugoslavio, en Kartvelio kaj nune en

Juĝistoj 9,7–15: 7 Kaj oni diris pri tio al Jotam, kaj li iris kaj stariĝis sur la supro de la monto Gerizim, kaj laŭte ekkriis, kaj diris al ili: Aŭskultu min, loĝantoj de Ŝeĥem, kaj aŭskultos vin Dio. 8 Iris la arboj, por sanktolei reĝon super si; kaj ili diris al la olivarbo: Reĝu super ni. 9 Sed la olivarbo diris al ili: Ĉu mi perdis mian grason, per kiu estas honorataj Dio kaj homoj, ke mi iru vagi super la arboj? 10 Kaj la arboj diris al la figarbo: Iru vi, reĝu super ni. 11 Sed la figarbo diris al ili: Ĉu mi perdis mian dolĉecon kaj miajn bonajn fruktojn, ke mi iru vagi super la arboj? 12 Kaj la arboj diris al la vinberujo: Iru vi, reĝu super ni. 13 Sed la vinberujo diris al ili: Ĉu mi perdis mian moston, kiu gajigas Dion kaj homojn, ke mi iru vagi super la arboj? 14 Tiam ĉiuj arboj diris al la dornarbusto: Iru vi, reĝu super ni. 15 Kaj la dornarbusto diris al la arboj: Se vere vi sanktoleas min kiel reĝon super vi, tiam venu, ŝirmu vin sub mia ombro; se ne, tiam eliros fajro el la dornarbusto kaj forbruligos la cedrojn de Lebanon.

Ukrainio. Ni vivis kelkajn jardekojn pensante ke la militoj estas for. Sed, ni devis seniluziiĝi.

La teksto el la libro de Juĝistoj ne rilatas al paco inter popoloj aŭ nacioj aŭ ŝtatoj sed al la paco ene de la popolo de la Izraelidoj. La ĉefa riproĉo de Dio al sia popolo estas ke ĝi forlasis Lin kaj liajn leĝojn, kaj ke tio havas konsekvencojn.

Vi certe aŭdis la nomon de Gideon, ankaŭ nomata Jerubaal. Li estis juĝisto kaj deĵoris dum 40 jaroj. Li havis multajn filojn. Post lia morto, la popolo volis fari el unu el ili, Abimeleĥ, sian reĝon. Antaŭe ne estis reĝo en la urbo Ŝeĥem kaj en la popolo. Tiu Abimeleĥ mortigis ĉiujn siajn fratojn, krom unu, kiu kaŝiĝis, Jotam.

Tiu Jotam ne akceptis la situacion, ne pro si mem sed pro la honoro de Dio. Tiam li iras sur monto vid' al vide la urbon kaj kriis tiun fabelon, tiun parabolon.

El tiu rakonto oni povas tiri kelkajn principojn pri la paco: 1) Milito sin nutras per sinsekvaj demisioj, 2) Paco konstruiĝas per aktivaj rezistadoj, 3) Paco estas ĉiam ĉena reakcio en kiu ĉiu havas sian parton.

La popolo demisiis pri sia respondeco en la aferoj de la urbo kaj de la tuta popolo kaj lasis ilin en la manoj de la ĉefoj. La arboj proponas la tronon unue al la olivarbo, kiu produktas oleon, por kuiri kaj ĉefe oleumi. Tiu ne volas engaĝiĝi kaj volas resti en sia posteno.

La arboj proponas tiam al la figarbo. Tiu same ne volas ĉar li preferas donaci dolĉecon.

Poste la arboj venis al la vinberujo. Tiu preferas provizi ĝojon kaj same rifuzas la respondecon.

La ŝajne saĝaj arboj demisias kaj lasas la postenon al alia, al la dornarbusto. Tiu anoncas ke li uzos siajn dornojn kaj sklavigos la arbojn anstataŭ servi ilin.



Jotam estis saĝa rezistanto. Li unue kaŝiĝis. Li bone analizis la situacion. Li bone vidis kio okazas. Li restis kvieta. Kaj prudente, de la supro de la monto, li kriis sian parabolon. Post Jotam, aliaj sekvos.

Rilate potencon, inverse agadis Jesuo. Li estas reĝo, sed la dornoj estis sur lia krono, lia trono estis la kruco. Li estas servanto. Jotam estis prototipo de li. La popolo devus havi nur unu reĝon, nome Dion mem. Kaj aperas ke Dio estas reĝo, ne kun minacaj dornoj sed kun savaj dornoj.

La savo provizita de tiu reĝo dorna krono estas paco, paco ĉar estas pardono, ĉar estas repaciĝo, ĉar estas konfido. Kaj tiu paco povas efektiviĝi ĉar tiu alportas ankaŭ la justecon. Tamen tiu justeco ne estas la justeco de la pli forta, sed la justeco por ĉiuj.

La kelkaj versikloj de la Psalmo kompletigas la bildon. Ili diras aferojn, kiujn oni povas kompreni: Ne eblas bono, kiam ne estas vero. Same, ne estas vero kiam ne estas bono.

Ne eblas justeco kiam ne estas paco kaj ne eblas paco kiam ne estas justeco.

En nia mondo regas mensogo. En nia mondo regas perforto. En nia mondo regas mizero. En nia mondo regas maljusteco. En nia mondo regas la akuzo al la alia, la rifuzo al la malsama. Nia mondo ne estas ideala. Nia mondo ne estas justa. Nia mondo ne estas en paco. Nia mondo ne vivas en la vero. Nia mondo faras malbonon.

Tamen troviĝas en la mondo kelkaj rezistantoj, kiuj batalas por la bono, por la vero, por la justeco, por la paco.

Sed tion oni jam sciis. "Vi estas en la mondo, sed vi ne estas el la mondo".

La misio de la kristanoj, de la Eklezio, ne estas fariĝi la reganto de la mondo, ĉar ĝi tiam fariĝos kiel la dornarbusto.

La misio, la atestado de la kristanoj estas proklami la Sinjorecon de Dio per Kristo, la Sinjorecon de Kristo, proklami la pacon kaj la justecon per la pardono, per la releviĝo, per la graco.

Atesti neniam estas devigi, proklami neniam estas submeti.

Popolo de Kristo, ĉu vi volas fariĝi reĝo? Ĉu vi volas fariĝi dornarbusto? Ĉu vi volas submeti la socion? Tion farante, vi tuj inverse submetiĝos al la regantoj, al la socio.

Aŭ ĉu vi preferas paŝi en la paŝojn de Jesuo Kristo, kiu vivis la bonon kaj la veron, la justecon kaj la pacon, ĝis sia morto kaj releviĝo? Ĉu vi akceptas submetiĝi por servi, por ami, kaj tiel montri al la vera reĝo, al nia Dio?

Amen

# Biblia vorto kaj mia penso

Karaj, kiu ne revas pri iu venonta tempo, kiam ĉiuj doloroj kaj suferoj de la homaro forpasos? Dum la tuta historio la homoj ĉiam denove klopodis per diversaj ideologiaj sistemoj krei "novan mondon", paradizon sur tero. Ĉiuj pli malpli frakasis, foje kun katastrofaj rezultoj. Tamen jen Dio mem kreos tiun novan mondon, kiam "la unuaj aferoj forpasos" kaj ni ne plu devas priplori la morton de amata persono. Ĉu ni perdis la esperon, ke tia mondo povus realiĝi? Ĝi certe venos, sed ne pere de homaj fortoj.

*Jerald Veit*

***

Apokalipso 21,1–4:
Kaj mi vidis novan ĉielon kaj novan teron; ĉar la unua ĉielo kaj la unua tero forpasis; kaj la maro jam ne ekzistis. Kaj mi vidis la sanktan urbon, novan Jerusalemon, malsuprenirantan el la ĉielo for de Dio, pretigitan kiel fianĉino, ornamita por sia edzo. Kaj mi aŭdis grandan voĉon el la trono, dirantan: Jen la tabernaklo de Dio estas kun la homoj, kaj Li loĝos kun ili, kaj ili estos Liaj popoloj, kaj Dio mem estos kun ili kaj estos ilia Dio; kaj Li forviŝos ĉiun larmon el iliaj okuloj; kaj la morto jam ne ekzistos; ne plu ekzistos funebro, nek plorado, nek doloro; la unuaj aferoj forpasis.

# Kongresa raporto

## Kristana kongreso 2024 de KELI en Vác, Hungario

Ágnes Ráczkevy-Eötvös, HU

Ĉijare denove mi (Ágnes Ráczkevy-Eötvös, HU) invitis kristanajn esperantistojn kongresi en Hungario. Ni havis la kongreson norde de Budapest, apud la Danubo en la urbeto Vác.

Nia kongresejo estis studenta hejmo de *Vilmos Apor Romkatolika Altlernejo*. En la dekstra alo de la impona, granda konstruaĵo troviĝis la ĉambroj (kun propraj banĉambroj kaj necesejoj).

En la maldekstra alo teretaĝe estis je nia dispono malgranda, bone ekipita salono, kie ni havis la matenajn kaj vesperajn preĝojn kaj kie ni aŭskultis la prelegojn.

En la unua etaĝo estis malgranda, etosa kapelo, kie ni havis nian Diservon ĵaŭde.

Vác estas episkopa centro, ni havis niajn manĝojn en la vizita centro de la proksima episkopa palaco.

En la ĝardeno de la kongresejo ni bone povis ĝui la ombron sub grandaj arboj en la varmaj someraj tagoj.

Sed ni vidu, kio okazis dum niaj komunaj tagoj!

**La 3an de aŭgusto** sabate posttagmeze-vespere (aŭ plej laste dimanĉe) ĉiuj partoprenantoj en ordo alvenis al la kongresejo. Estis tre bone renkontiĝi kun malnovaj geamikoj, kaj ankaŭ estis granda ĝojo ekkoni novajn kristanajn esperantistojn. Sed el unu vidpunkto nepre ne estis diferenco: ĉiuj kiuj partoprenis, estis mirinde aktivaj kaj riĉigis la enhavon de nia kunestado — danko por tio!

Post la vespermanĝo ni havis gajan interkonan vesperon, ni konatiĝis unu kun la alia per la signifo de niaj nomoj.

Enkonduka prelego de Philippe Cousson. /BÅn



Viktor Simonnet kaj Philippe Cousson kunlaboras. /BÅn



Ni fermis la tagon per vesperpreĝo, kiun mi, la organizanto gvidis.

**La 4an de aŭgusto** dimanĉe post la matenmanĝo ni praktikis kantojn per la helpo de orgenisto, ĥorestro Magnus Sundman, SE. Nian Diservon gvidis Philippe Cousson, FR, kaj la centra temo de lia prediko estis nia ĉijara kongresa temo: "Justeco kaj paco sin kisas" (Psalmoj 85,11)

Post la tagmanĝo ni havis tre interesajn prelegojn.

Tradicie la unuan prelegon faris pri la kongresa temo Philippe Cousson.

Poste mi havis prelegon pri la nomdonanto de la altlernejo: Vilmos Apor.

Fine Oldřich Arnošt Fischer, CZ, prelegis al ni tre interese pri la vivo kaj laboro de Bernardo Bolzano.

Post la vespermanĝo ni daŭrigis la konatiĝon, denove vigle kaj tre ŝerce. La vesperpreĝon gvidis Pavel Polnický, CZ.

**La 5an de aŭgusto** lunde ni havis tre densan programon surloke.

La matenpreĝon gvidis Bengt Olof Åradsson, SE. Post la matenmanĝo ni promenis kun ĉiĉerono en la urbocentro de Vác, kaj ni aŭskultis interasajn detalojn pri la urba historio, konstruaĵoj, skulptaĵoj kaj aliaj memoraĵoj.

Post la tagmanĝo kaj iom da ripozo unue Pavol Petrik, SK, prelegis pri Titus Brandsma, poste Petr Chrdle, CZ, prezentis sin mem kiel aŭtoro kaj tradukinto.

Ni ripozis per mallonga kafpaŭzo antaŭ la sekvontaj du interesaj prelegoj: Teresa Nemere, PL, rakontis al ni pri tradiciaj polaj paper-eltondaĵoj. Ŝi ankaŭ kunportis ekzemplojn de tiu ĉi tre interesa kaj malfacila artaĵo, do ni povis admiri la detalan teknikon, per kiu oni faris, faras ilin. Poste prelegis Václav Pospíšil, CZ, kaj lia prelego havis la titolon: "Dia regno inter ni". Fermis la serion de prelegoj Barbara Gulminelli, FR, kiu rakontis kaj montris bildojn pri sia vizito al Taize.

Post la vespermanĝo Pavel Polnický gvidis tre ŝercan konkurson pri Eŭropo kun interesaj demandoj.

Urba promeno. / BÅn



Prelego de Pavol Petrik. /BÅn



La tago finiĝis per vesperpreĝo de Viktoro Simonnet, FR.

Dum la kantadoj de la preĝoj kaj Diservoj ludis per piano al ni Magnus Sundman, kaj ofte ankaŭ per violono Agneta Järlström SE kaj per klarneto Bohuslava Převrátilová, CZ.

**La 6an de aŭgusto** marde post matenpreĝo, kiun gvidis Pavol Petrik, ni vizitis la episkopan palacon. La palaco ne estas nur turisma vidindaĵo, funkcias tie la diversaj oficejoj de la granda diocezo, kaj ankaŭ la episkopo vivas tie. Pri la plurcentjara historio de la domo tre interese rakontis al ni nia ĉiĉeronino.

Antaŭ la tagmanĝo ni povis aŭskulti prelegon de Bohuslava Převrátilová, CZ pri Sankta Francesco el Assisi.

La posttagmezon ni pasigis en la preleg-salono.

Unue Petr Chrdle havis tre gravan kaj instruan prelegon per la titolo: (Mal)-konvena informado pri Esperanto. Poste Pavel Polnický parolis al ni pri Memoro de nacio (Paměť národa).

En la dua parto de la posttagmezo unue prelegis Margareta Andersson SE pri Sanktulino Birgita, poste ni aŭskultis Bengt Olof Åradsson pri feliĉo kaj dankemo.

Post la verspermanĝo denove Bengt Olof Åradsson rakontis al ni pri vera unikaĵo, pri historio, preskaŭ eĉ kalvario de plurcentjara sveda vilaĝo en Ukrainio.

Ni fermis la tagon per vesperpreĝo, kiun gvidis Václav Pospíšil.

**La 7an de aŭgusto** merkrede Oldřich Arnošt Fischer gvidis la matenpreĝon, kaj poste ni havis tuttagan ekskurson al belega nacia botanika ĝardeno de Vácrátót. Atendis nin tie Erzsébet Fráter, biologo kaj botanikisto, honora lektoro de la Universitato de Debrecen, kiu gvidis nin tra ĝardeno per promenado per titolo "Plantoj de la Biblio".

Multegajn interesajn plantaĵojn ni ekkonis, pri kiuj ni jam legis, sed ofte ne sciis, kiel ili aspektas. Ni lernis, kie ili estas menciitaj en nia sankta libro, kiel oni uzis ilin, ktp. Dum la longa prome-

Du svedaj amikinoj, Margareta Andersson kaj Agneta Järlström. /BÅn



Prelegis ankaŭ Václav Pospíšil. /BÅn



nado ni havis tagmanĝon en la botanika ĝardeno, kaj estis bone ripozi en ombro sub maljunaj, grandegaj arboj, gustumante hungaran specialaĵon, panlangoŝon.

Post la vespermanĝo kun nia filo, André Åradsson, SE ni rakontis pri pilgrimado, kiun ni faris antaŭ du jaroj, sur la vojo de Sankta Olav en Svedio kaj en Norvegio.

Ni fermis la longan tagon per vespera preĝo, kiun gvidis Ruth van Puijenbroek, CH.

**La 8an de aŭgusto** ĵaŭde la matenpreĝon gvidis Philippe Cousson.

Poste ni vizitis la Eklezian Kolekton, kie nia ĉiĉeronino montris al ni multajn belajn objektojn, kiujn episkopoj kolektis dum la longa historio de la diocezo.

Antaŭ la tagmanĝo KELI havis sian kutiman jarkunvenon.

La tagmanĝon kaj ripozon sekvis Diservo kun Sankta Manĝo laŭ protestanta rito, predikis Philippe Cousson.

Post la vespermanĝo mi gvidis biblian rondon per bibliaj citaĵoj, kiujn ni legis kaj interparolis pri ili.

La vesperon Pavol Petrik fermis per vespera preĝo.

**La 9an de aŭgusto** vendrede la tagon ni komencis per la matenpreĝo de Viktor Simonnet, FR.

Ni havis tuttagan ekskurson vendrede. Per ŝipo sur la Danubo ni iris norden al Visegrád, kie ni unue el panorama teraso vidis la belegan pejzaĝon de la Danubkurbiĝo. Poste ni vizitis Salamon-turon, kie multaj kuraĝuloj iris al la supra parto per pli ol cent ŝtupoj! Ni havis ankaŭ tre interesan spektaklon: kavaliran prezentadon, kiun faris grupo de gardantoj de kavaliraj tradicioj.

Ne eblas forlasi Hungarion sen gustumi unu el la plej tradiciaj manĝaĵoj: gulaŝsupon! Do kompreneble tiun ni tagmanĝis antaŭ nia lasta programpunkto, la vizitado de la iama reĝa palaco. Ankaŭ tie per la helpo de lerta kaj simpatia ĉiĉeronino ni ekciis multe pri la vivo en la kastelo dum la 14a–15a jarcento.

Barbara Gulminelli prelegas. /BÅn



Pavel Polnický prelegas. / BÅn



Post la vespermanĝo ni jam alvenis al la lasta vespero, kiu havas la "devigan" programon: la adiaŭan vesperon. Multajn programerojn la kongresanoj prezentis, interesajn kaj tre ŝercajn ludojn, legaĵojn, ŝercojn, kantadojn, do ni havis longan kaj vere amuzigan vesperon, kiun ni finis per la vesperpreĝo de Philippe Cousson.

**10a de aŭgusto** sabate mi fermis la kongreson per matenpreĝo.

Mi multe dankas al ĉiuj la aktivan partoprenadon, la interesajn preĝojn kaj prelegojn.

Ĝis revido je nia sekvontjara kongreso, pri kio esperebleble baldaŭ ni jam havos konkretajn informojn.

Fotis:
BÅn: Bengt Olof Åradsson
OF: Oldřich Arnošt Fischer

Tri amikonoj: Terezia Scurt, Katalin Popoviciu, Pavla Studená. /BÅn



Diversnacia 'koruso' dum adiaŭa vespero. /BÅn



Teresa Nemere montras popolan polan arton. /OF



Vizito al botanika ĝardeno. /OF



Petr Chrdle, Tibor Kepencay kaj aliaj dum promeno. /BÅn



Mária László kaj Sándor Monostori interparolas. /BÅn



Kafo- kaj glaciaĵripozo. /BÅn



Surŝipe al Visegrád. /OF



Ruth van Puijenbroek kaj André Åradsson interparolas dum promenpaŭzo. /BÅn



Vizito al la episkopa palaco. /OF



# Sekcio de kristanaj esperantistoj de ĈEA sincere invitas Vin

## partopreni la Kristanan Esperanto-Kongreson

## 74an kongreson de KELI

### 26. 7. – 2. 8. 2025, Pardubice, Ĉeĥio

*"En la mondo, sed ne el la mondo"* (Joh 17)

Pardubice estas universitata urbo en orienta Bohemio, proksimume 140 km de Brno kaj 100 km de Prago. Ĝi situas 230 m. super marnivelo kaj havas pli ol 90 mil loĝantojn. Bone atingebla estas trajne, buse kaj aŭtomobile (parkejo senpaga ĉe la kongresejo).

La unua skriba mencio pri la ekzisto de Pardubice devenas el la jaro 1295, kiam tie la papo Bonifaco la 8a fondis monaĥejon de Kavalira ordeno de krucanoj kun ruĝa stelo kaj preĝejon de Sankta Bartolomeo. En 1340 heredis la urbon Arnošt z Pardubic, posta unua praga ĉefepiskopo. La plej fama periodo datiĝas ekde la jaro 1491, kiam la urbon aĉetis elstara nobela familio Pernštejn. Tiam ekestis urbo kun firma fortikaĵo. Ekde la jaro 1560 posedis Pardubice la ĉeĥa reĝo.

Ekfloro de la urbo komenciĝas dum la unua duono de la 19a jarcento rilate al la konstruo de la fervoj-linio Prago-Pardubice-Olomouc kaj ekesto de multaj fabrikoj en la dua duono.

En la studenta hejmo estas 3-litaj ĉambroj, ĉiam du havas komunan duŝon kaj necesejon (sed vi povas esti sola aŭ du en la ĉambro – necesas alpago).

**Kongresejo**: Střední zdravotnická škola, Průmyslová 395.

***La kongreson povas partopreni ĉiuj esperantistoj, kiuj volas ĝui kristanan medion.***

El provizora programo:

- oficiala malfermo de la kongreso
- matenaj kaj vesperaj preĝoj
- interkona kaj adiaŭa vesperoj
- ekumena diservo
- trarigardo de la urbo
- prelegoj, kantado
- koncerto
- jarkunveno de KELI
- ekskursoj (detaloj pli poste)

# Kristana Kongreso – 74a kongreso de KELI

*"En la mondo, sed ne el la mondo"* (Joh 17)

# Aliĝilo

Vi akceptas per la Aliĝilo la sekvontajn kotizojn:
**Tarifo A:** ekssocialismaj landoj, Afriko, Sudameriko.
**Tarifo B:** ĉiuj aliaj landoj.

**La aliĝo validas nur post la pago de garantia aliĝsumo** **Sumoj en EUR**

| **Aliĝkosto** | ĝis 31.12.2024 | ĝis 31.3.2025 | post 1.4.2025 | **Kongreskosto** |
|---|---|---|---|---|
| Kategorio A | 20 € | 30 € | 40 € | 270 € (*290 **310) |
| Kategorio B | 40 € | 50 € | 60 € | 310 € (*340 **360) |

* du en la ĉambro, ** unu en la ĉambro

La kongreskotizo inkluzivas tranoktojn, manĝojn kaj ekskursojn, SED neniu asekuro.
Ĉiu kongresano por kongresaj tagoj prizorgu por si la asekuron en sia lando.

Eblas sendoj de monbiletoj (EUR) per registrita letero al Pavel Polnický.

- Ĝis 31.12.24 pagu al: **ING BANK** al **Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam** por konto **kelk-p** de **KELI.**
  **BIC:** INGBNL2A
  **IBAN:** NL 72 INGB 0000 3789 64
- Post 1.1.25 pagu al: **Komerční banka Poděbrady,** kontonumero: **123-8307340217/0100,** kontonomo: **Sekce křesťanských esperantistů, ČES;**
  **BIC/SWIFT**: KOMBCZPPXXX**,**
  **IBAN:** CZ8601000001238307340217

**La aliĝilon sendu al:**

Pavel Polnický
Lidická 939/11
CZ 290 01 Poděbrady
Ĉeĥio

Telefono : +420 723 672 335
Retadreso: polnickypavel@seznam.cz

# ALIĜILO

**Mi aliĝas al 74a KELI Kongreso**
**26. 7. – 2. 8. 2025, Pardubice, Ĉeĥio**

S-ro ☐ /S-ino ☐ Persona nomo: ....................................................................

Familia nomo: ..............................................................................................

Adreso:

Lando (en Esperanto): ...............................................................................

Urbo/vilaĝo: ........................................ Poŝtkodo: ............................

Strato kaj numero: .....................................................................................

Telefono: ...................................................................................................

Retadreso: .................................................................................................

Mi mendas ĉambron en studenta hejmo: unu-litan ☐, du-litan ☐, tri-litan ☐

Mi preferas dividi la ĉambron kun: ...........................................................

Mi estas vegetarano: JES ☐ NE ☐, Mi bezonas alian dieton: ......................

Mi postulas (specialajn dezirojn): ..............................................................

Mi planas alveni per: aŭtomobilo ☐ trajno ☐ buso ☐

Mi planas alveni je (dato kaj horo, se eblas): ...............................................

Mi planas foriri je (dato kaj horo, se eblas): ...............................................

Mi proponas jenajn kontribuojn al la kongresa programo:


Mi estas preta gvidi matenan aŭ/kaj vesperan preĝojn: JES ☐ / NE ☐

Mi povus prelegi pri: ...............................................................................

Garantian sumon: ............. EUR/CZK mi pagis al: .......................................

Mi permesas, ke la fotoj faritaj dum la kongreso oni rajtu publikigi kaj en la revuo Dia Regno kaj surrete. JES ☐ / NE ☐

Dato: ......................... Subskribo:...........................................................



Pardubice, placo Pernštýn, sudorienta flanko, kunmetaĵo. Far Ludek. CC BY 3.0, wikimedia.commons



Stukaĵo pri Jan Hus sur ŝtiparo de Vilém Amort. Fotis Jerzy Strzelecki. CC BY 3.0, wikimedia.commons

Preĝejo de St. Bartolomeo
Fotis Prazak. CC BY 3.0, wikimedia.commons



# Pardubice

Pardubice – Pernštýnské placo el la regiona biblioteko. Fotis Prazak, CC BY 3.0, wikimedia.commons



# La sveda sanktulino Elisabeth

## Prelego dum la kristana kongreso en Bjalistoko, 2023

Bengt Olof Åradsson, SE

Kiam Maria Elisabeth Hesselblad, (1870 – 1957), estis honorita kiel sanktulino ene de la Romkatolika Eklezio, tio estis granda okazaĵo por multaj svedoj, eĉ la protestantoj.

Depende de vidpunkto oni povas diri ke troviĝas kvar svedaj sanktul/o/inoj. Sankta Sigfrid (viro) estas iom duba ĉar la origina dokumento malaperis, sed estas menciita en samtempa dokumento. La unua virino, Anna el Novgorod, estis kanonizita ene de la Ortodoksa Eklezio. Sankta Birgita kaj Sankta Elisabeth estas kanonizitaj de Romkatolikaj papoj.

Indas kelkaj linioj pri la aliaj du sanktulinoj. La unua, Ingegerd Olofsdotter, estis filino de la unua kristana sveda reĝo Olof Skötkonung. Ŝi naskiĝis



Elisabeth en la junaĝo. Vikipedio, public domain

ĉirkaŭ la jaro 1000 kaj edziniĝis kun Jaroslav I, kieva princo de Novgorod. Tiam ŝi prenis la nomon Irina. Post la morto de la edzo, ŝi dediĉis sin intense al religia vivo. Je la fino de sia vivo, ŝi ordonis sin kiel monaĥinon en striktan ordenon, kaj ricevis la nomon S:ta Anna. Ŝi estis entombigita en Kiev. La Ortodoksa Eklezio kanonizis ŝin en 1439. Relikvoj de ŝi troviĝas en tri landoj: Ukrainio, Rusio, Svedio.

La plej konata sveda sanktulino estas S:ta Birgita. Ŝi naskiĝis en 1303 kiel Birgita Birgersdotter. Edziniĝis en la jaro 1316 kun Ulf Gudmarsson kaj naskis 8 infanojn. La edzo mortis en 1344 kaj poste Birgita vivis simple kaj solece. Jam de la infanaĝo Birgita havis revelaciojn, kiuj oftiĝis dum la jaroj. En 1349 ŝi vojaĝis al Romo kaj tie restis. En 1360 ŝi petis la papon aprobi ŝiajn regulojn pri nova ordeno. Post pilgrimado al Jerusalemo 1373, ŝi mortis samjare en Romo. En 1999 Birgita estis nomumita unu el la tri sanktaj patroninoj de Eŭropo (kun Sankta Katarina el Sieno kaj Sankta Tereza Benedikta de la Kruco), fare de papo Johano Paŭlo la 2a.

La tria sanktulino, S:ta Elisabeth, naskiĝis la 4an de junio 1870. Ŝi estis la kvina infano en la familio. Finfine ŝi havis 12 gefratojn. La familio vivis en la vilaĝeto Fåglavik ĉirkaŭ 95 km oriente de Gotenburgo. La domo en Fåglavik

daŭre restas tie. La patro estis komercisto kaj la familio Hesselblad havis butikon en Fåglavik.

Kiam Maria Elisabeth naskiĝis, neniu akuŝistino estis trovebla kiam venis la tempo. Stina, maljuna virino en la najbareco helpis ĉe la nasko kaj Stina povis levi la novnaskitan bebon. Estas rakontite ke Stina metis la bebon sur la ŝtonon antaŭ la kahelforno. “Kial vi faras tion” — demandis la novpatrino? Stina haltas kaj diras; “La infano devas esti hardita, ŝi havos grandajn provojn antaŭ si, kaj fariĝos io tre speciala”.

Multe pli poste, ĉi tiu evento estas elstarigita kiel stranga antaŭsigno.

La familio estis religiema kaj Elisabeth estis kompreneble baptita en la luterana kredo. En Svedio, post la reformacio ĝis meze de la 19a jc, oni laŭleĝe devis esti baptita kaj membro en la ŝtata eklezio. Kiam tiuj kaj aliaj limigoj malaperis, la religia aktiveco floradis, kaj multaj liberaj eklezioj, kiuj hodiaŭ ekzistas en Svedio, fundiĝis en tiu tempo. Multaj konatuloj kaj geamikoj de la familio Hesselblad membriĝis en tiuj liberaj eklezioj.

La familio de Elisabeth regule partoprenis en la luterana eklezio. Ankaŭ hejme ili diskutis kaj parolis pri religiaj temoj. Jam de juna aĝo Elisabeth ĉiutage legis la Biblion. Elisabeth skribas, ke ŝi preparis sin jam unu jaron antaŭe por la unua Sankta Manĝo dum la konfirmacio. La restantan konfirmacian tagon ŝi restis en soleco, en ploro kaj preĝo al la Sinjoro. Bibliajn vortojn kiuj frapis ŝin kaj kiuj fariĝis grava demando estis: ”Kiu grego estas la ĝusta?” (Joh 10:16 Kaj aliajn ŝafojn mi havas, kiuj ne estas de ĉi tiu gregejo; ilin ankaŭ mi devas alkonduki, kaj ili aŭskultos mian voĉon; kaj estos unu grego, unu paŝtisto.)

Neniam la familio vivis abunde, sed havis bonan, feliĉan, tradician familian vivon kun multe da amo kaj respekto. La kreskanta familio postulis pli kaj pli da devoj de Elisabeth, kiujn ŝi kun ĝojo provis plenumi. Tra la vivo oni nomumis ŝin: ”Nia mirinda Elisabeth”. ”Ni ĉiam povis iri al Elisabeth kun niaj zorgoj; ŝi ĉiam havis tempon kaj intereson pri ĉio kaj ĉiuj. La multaj zorgoj verŝajne estis la kaŭzo de ŝia malsano — 12-jaraĝe ŝi serioze malsaniĝis en stomaka ulcero.

La patro estis malsanema kaj la komerco bankrotis. Dufoja bankroto igis la familion transloĝiĝi en ”malriĉulan” domaĉon. Samtempe, dum la 19a jc, pro malfacilaj vivkondiĉoj, multaj homoj el Svedio elmigris al Usono, kaj en 1887, kiel apenaŭ 17-jarulino ankaŭ Elisabeth migris tien, por gajni monon por povi helpi kaj subteni la familion.

La unua laboro estis hejma servistino kaj pro longaj kaj streĉaj labortagoj la malnova malsano reaperis. Pro miszorgado kaj neglekto en hospitalo ŝia sanstato malboniĝis. En siaj doloroj ŝi turnis sin al Dio kaj preĝis ”… se mi saniĝos sufiĉe, helpu min zorgi pri malsanuloj kaj malfortuloj. … Helpu min helpi aliajn ke ili ne estu forgesitaj.” Post 6 semajnoj ŝi forlasis la liton kaj dum la sekva resanigado ŝi asistis la flegistinojn en la hospitalo.

Elisabeth spertis ke Dio aŭskultis ŝiajn preĝojn kaj tuj post la forlaso de la hospitalo, Elisabeth aliĝis al flegistina

edukado. Proksime al la hospitalo/lernejo oni konstruis novan romkatolikan preĝejon, Saint Patrick's, kaj de tie ofte venis vunditaj laboristoj al la hospitalo. Tiam Elisabeth unuan fojon en sia vivo renkontiĝis kun rozario, kaj ŝi forte surpriziĝis kiam ŝi aŭdis la homojn preĝi al Maria.

Post iama naskiĝtaga festo en la hospitalo, kiel interesaĵo, oni decidis viziti la mortintejon je la noktomezo. Elisabeth volis, sed ne sukcesis protesti kaj decidis, estante inter la pli maljunaj flegistinoj, ke ŝi akompanu kaj apogu la pli junajn flegistinojn. En la plej malvarma ĉambro oni kolektis la mortintojn, kiuj ĉi-foje estis nekutime multaj. Paŝante en la ĉambro Elisabeth komencis preĝi por la mortintoj kaj por la vivantoj, ke ili povu fini siajn taskojn antaŭ ili finas sian teran vivon. Farante tion, ŝi iom malproksimiĝis de la grupo. Subite la grupo malaperis — la pordo fermiĝis — kaj ĝin eblis malfermi nur de ekstere!

Elisabeth tamen ne timiĝis. Ne sciante kiom longe ŝi restus tie, ŝi faris planon. Por teni sian varmon kaj por havi ion fari — ŝi komencis nun paŝi de unu korpo al la alia kaj preĝi por ĉiu individue. Tamen — ne estis tute silente — krom la propraj sonoj — Elisabeth aŭdis ion. Ĉu spirado?

Jes, ĉirkaŭirante kaj kontrolante ŝi trovis ke la korpo de junulo estis iom pli varma. Laŭ la apuda indiko la junulo mortis pro atako de kormalsano. Elisabeth komencis masaĝi liajn manojn, piedojn, bruston kaj faris kor-pulman revivigon. Ŝi donis plurajn de siaj vestaĵoj kaj kiam la junulo iom reviviĝis ŝi povis doni iom da konjako, kiun ŝi havis en sia poŝo.

Matene oni trovis lacan kaj preskaŭ nevestitan flegistinon kaj junulon en flegistina uniformo.

En siaj memoraĵoj ŝi skribas ke dum la jaroj post la konfirmacio en Svedio, ŝia animo estis plena da duboj kaj ŝi ne trovis iun eklezion kie ŝi trovis sin hejme. Dum la jaroj, laborante en la granda hospitalo, Elisabeth vizitis multajn diversajn ekleziojn por trovi la idealan kredon, Lian gregon, kiun Kristo iam promesis al ŝi. Kun katolika konatulo, kiun ŝi ekkonis dum siaj unuaj jaroj kiel servistino, ŝi vizitis dominikanan monaĥinejon dum kelktaga libertempo.

Tie troviĝis monaĥino kun vundita sed kuracebla brako kaj Elisabeth aranĝis ke ŝi venu dum kelkaj semajnoj kaj ĉiutage kelkhore zorgi pri la brako. Tio donis al ŝi ĉiutage kelkajn horojn liberon kaj eblecon viziti la tiean bibliotekon kaj legi librojn, i.a. prelegojn de kardinalo Wiseman pri la reala ĉeesto de Kristo en komunio. Tio kongruis kun la sentoj kaj spertoj de Elisabeth dum ŝia serĉado. Sed, daŭre ŝi havis problemon kun la adorado kaj preĝo al Maria.

Ricevante telegramon de Svedio pri la morto de la patro, ŝi en sia ĉambro en preĝo ”transdonis” lin — ”Maria, mia patrino, mi donas lin al vi …”. Estis grava turnopunkto por Elisabeth, sed longa vojo daŭre restis antaŭ ŝi.

Kun du fervoraj katolikaj amikinoj ŝi vizitis Eŭropon. Kiam ili vizitis la S:t Gudula-katedralon en Bruselo, ŝi kaŝis sin malantaŭ pordo, ĉar ŝi ne volis partopreni en la kutimaj ceremoniaj agadoj, sed kiam la procesio preterpasis ŝin, ŝi aŭdis voĉon ”mi estas tiu kiun vi serĉas”.

Elisabeth skribas ke tiu impreso neniam forlasis ŝin. Alia turnopunkto estis, ke reveninte al New York, unu el la amikinoj eniris monaĥinejon, kio forte movis Elisabeth. En 1902, post 20 jaroj plenaj da pensado, serĉado kaj preĝado, Elisabeth petis esti akceptita en la romkatolikan eklezion, kaj kiel vivlonga spirita gvidanto ŝi ricevis J.C. Hagen. La 15an de aŭgusto 1902 ŝi ricevis la katolikan bapton.

La vivo kaj historio pri S:ta Birgita fascinis Elisabeth jam dum la lernejaj jaroj. Ŝi skribas en siaj notoj, ke ”kiel infano mi vidis min starante sur placo vidante la domon en kiu S:ta Birgita vivis en Romo. Mia rigardo fiksiĝis je fenestro maldekstre. Poste mi vidis min mem staranta en tiu fenestro eksterenrigardi. Kiam mi legis la svedan historion, mi ekinteresiĝis pri tiu loko kaj sopiris tien iri”.

La tiamaj libroj ne estis ilustritaj kiel la hodiaŭaj, kaj ŝi ne havis veran bildon pri la domo.

Dum dua vojaĝo al Eŭropo, kun malfacilaĵoj pro la malnova malsano, Elisabeth kaj la amikino ankaŭ planis viziti Romon, post Britio kaj Svedio. Survoje de la hotelo al la baziliko de S:ta Petro, la droŝko volis veturi alian vojon — kaj subite Elisabeth ekstaris kaj kriesprimis “La domo — La domo de Birgita”.

Ŝi vidis la domon kiun ŝi jam en sia sonĝo/revelacio vidis. Sed. La domo de Birgita estis okupita de karmelanoj.

Kiel eble plejofte, dum la restado en Romo, Elisabeth vizitis la domon de Birgita, la ĉambron kie ŝi vivis kun sia filino kaj kie ŝi mortis. Elisabeth ofte vizitis la tiean preĝejon, kie ŝi, dum sia tempo en Romo, ricevis la romkatolikan konfirmacion kaj lige kun tiu, papan benon kaj eĉ aŭdiencon ĉe Leo XIII.

Survoje reen al Usono, Elisabeth plurfoje aŭdis la internan voĉon — ”returnu al Romo, al la domo de Birgita”, sed ŝi timis ke estis iluzioj. Pastroj, kiujn ŝi konsultis, proponis al ŝi aliajn taskojn kaj vojojn antaŭen. Granda provo al Elisabeth aperis: ŝi ricevis la vorton/voĉon ”vendu viajn posedaĵojn kaj sekvu min”. Tio signifus ke ŝi vendu la domon, kiun ŝi aĉetis al la patrino kaj la gefratoj, sed surprize, la familio pli facile akceptis la ideon ol Elisabeth mem.

Reveninte al Usono ŝi ”dronigis” sin en laboron — kaj malsaniĝis. Samtempe ŝi korespondadis kun la priorino en Romo kaj oni bonvenigis Elisabeth veni kaj tie labori kun ili. Pro la serioza sanstato la kuracistoj ne donis al Elisabeth multajn monatojn, do la peto ŝanĝiĝis al veni al Romo kaj morti en la ”domo de la spirita patrino (Birgita)”.

La amikino multmaniere provis bari Elisabeth vojaĝi al Romo kaj certis ke ŝi jam survoje mortos, sed post longa vojaĝo Elisabeth venis al Romo en 1904 kaj estis akceptata en la monaĥinejon. Ŝi ricevis ĉambron, kie ŝi povis dormi kaj ripozi post la vojaĝo. Matene ŝi kun granda malfacilaĵo povis malfermi la fenestrokovrilojn kaj eksterenrigardis. Post iom da tempo Elisabeth realizis ke estis ĝuste tiu fenestro, en kiu ŝi vidis sin mem en la infanaĝa revelacio!

Pro ŝia malsano ŝi eĉ ricevis la lastan sanktoleadon, sed tamen transvivis kaj

inter la jaroj 1904–1906 Elisabeth restis en la karmelana monaĥinejo kiel novicino. Ŝia revo estis ke ŝi havu similajn vestaĵojn kiel S:ta Birgita sed ĉu eblus kiel karmelana monaĥino? Post kelkaj baraktoj ankaŭ tiuj baroj malaperis kaj ŝi povis porti la deziratan birgitinan vestaĵon kiam ŝi donis siajn votojn.

Elisabeth pli kaj pli firmiĝis en sia kredo ke ŝi en Romo revivigu la birgitinan ordenon. Ŝi kolektis librojn kaj petis informon kaj studis la originon kaj la regulojn de la birgitina ordeno. Ŝi vizitis alilandajn monaĥinejojn de la aliaj branĉoj de la birgitina ordeno, kiuj transvivis depost la mezepoko — entute naŭ en Hispanio, Germanio, Anglio kaj Nederlando.

En 1911, kiam ŝi revenis al Romo, estis nova priorino ĉe la karmelanoj kaj Elisabeth ne plu estis plene akceptata enveni kaj partopreni en la ĉiutaga vivo kiel antaŭe. Samtempe unu birgitina monaĥinejo pretis sendi kelkajn provnovicinojn, sed kie ili verku? Papo Pius X akceptis kaj aprobis la peton de Elisabeth fondi novan komunumon. En 1919 kaj la postaj 10 jarojn ili laboris je Via delle Isole.

Elisabeth havis multajn kontaktojn kun nobelaj kaj altrangaj svedaj homoj, kiuj kun intereso vizitis la komunumon en Romo. Eĉ la princo Oscar Bernadotte, frato de la tiama reĝo, vizitis ilian domon. La revivigo de la birgitina ordeno en Romo estis parto de sveda historia, religia kaj kultura memoraĵo.

En 1923 Elisabeth partoprenis en Vadstena la 550an datrevenon de la morto de Birgita. Pro la vekigita intereso pri Birgita, du asocioj formiĝis (S*ocietas Sanctæ Birgittæ* kaj *Birgittastiftelsen*), i.a. kun la celo restaŭrigi la Vadstenan monaĥejon. Kiam en Svedio Elisabeth establis ”ripozdomon” apud Stokholmo, la birgitina ordeno revenis al Svedio, post plurcentjara foresto.

En Romo la karmelanoj finfine forlasis la domon de Birgita en oktobro 1930. En aprilo 1931 Elisabeth ricevis la ŝlosilojn al la domo. Post renoviga laboro la komunumo povis enloĝiĝi aŭtune 1931. Finfine ŝi estis ”hejme”.

La nova ordeno — la sveda branĉo de la birgitina ordeno kreskis kaj fondis novajn monaĥejojn/ripozlokojn en Italio, Svedio, Hindio, Meksiko, Usono, Kubo. Entute ĉirkaŭ 50 (2015). La kunlaboro ne ĉiam estis glata kun aliaj branĉoj de la birgitina ordeno.

Dum la Dua Mondmilito Elisabeth laboris en Romo por protekti persekutitajn judojn. Meze de la germana okupado de Romo, ŝi kaŝis plurajn judojn en la monaĥejo en Piazza Farnese kaj aranĝis tie provizoran sinagogon. Pro tio, en 2004 ŝi estis postmorte premiita per la premio “Justuloj inter la popoloj” fare de la israela ŝtato.

Ŝi mortis en 1957 en Romo, kie ŝi ankaŭ ricevis sian finan ripozlokon.

### Fonto

Marguerite Tjäder, (1988), *Moder Elisabeth*, Stockholm: Verbum.

**Organizanto:**
Esperanto-Ligo por Kristanoj en Germanujo r.a. Landa sekcio de Kristana Esperantista Ligo Internacia (KELI).
Prezidanto: pastoro Wolfram Rohloff,
Am Marktplatz 82,
D-09496 Marienberg-Zöblitz

## Bibliaj Tagoj

en Kaub ĉe l' Rejno

de 2025-03-19 ĝis 2025-03-23
(merkredo - dimanĉo)



Kaub ĉe l' Rejno, urba turo

**Partopren-kotizoj:**
La prezo por tranoktado kaj 3 manĝoj tage en 2-lita ĉambro (surteraj litoj) kun duŝo/necesejo, ekskursa programo 280 €,
post 2024-08-31 290 € por ĉiu persono.
Rabatoj: Loĝantoj en eksterlando -75 €, en Germanio loĝantaj KELI-membroj aŭ ties samadresano -25 €. Krompago por 1-lita ĉambro (entute): +45 €.

**Programo**
**Teologia temo**: fiksota (Wolfram Rohloff). Komuna preĝado kaj kantado per "Adoru" (muzika kadro: Stefan Lepping). Ĵaŭdon ĝis sabato: Turismaj ekskursoj (Ulrich Matthias). Aktualajn detalojn vidu en la Interreto: www.esperanto.de/keli.

**Nia kunvenejo**
Rejn-migrovoja junulargastejo
Zollstr. 46
D-56349 Kaub ĉe l´ Rejno
Tel. 0049 6774 918 1890
www.diejugendherbergen.de/kaub
Situo: ĉ. 600 m de la stacidomo, en la urbocentro, 80 m de la Rejno-bordo

**Kondiĉoj de aliĝo**
Via aliĝo validas post la alveno de via antaŭpago de 40 € por ĉiu persono kaj estos konfirmata post ricevo. La reston de la kotizo ĝiru ĝis la **15a de januaro 2025**.
Aliĝoj post tiu dato nur eblos, se estos liberaj lokoj.

La antaŭpago estos repagebla, se vi aligas anstataŭanton (samseksan). Tiu, kiu nur pro financaj kaŭzoj ne povus partopreni, petu subvencion de la Fondaĵo de Familio Fischer.

Ajnajn demandojn kaj petojn direktu al la
**komisiito por organizado kaj financoj**
Rudolf Fischer, Amtmann-Daniel-Str. 11c, D-48356 Nordwalde
☎ 0049 2573 / 626 und 0049 152 075 175 26
💻 fischru@uni-muenster.de

## Jen mi aliĝas definitive al la Bibliaj Tagoj
de 2025-03-19 ĝis 2025-03-23 en Kaub ĉe l´ Rejno.

(titolo+)nomo: ______________________________

strato/domnum.: ______________________________

kodo, urbo: ______________________________

telefono: ______________________________

poŝtelefono: ______________________________

retpoŝta adr.: ______________________________

membro de KELI kun "Dia Regno" ☐ jes ☐ ne

vegetarano ☐ / laktozo ☐ / ceteraj limigoj ☐ ____________

Mi veturas senpage per ÖPNV ☐
Miaj nomo, urbo, retadreso rajtas aperi en la listo de partoprenantoj ☐

☐ La aliĝanto mendas 2-litan ĉambron kune kun:

Nomo: ______________________________

vegetarano ☐ / laktozo ☐ / ceteraj limigoj ☐ ____________

Mi veturas senpage per ÖPNV ☐
Miaj nomo, urbo, retadreso rajtas aperi en la listo de partoprenantoj ☐

☐ La sumon de ________€ mi ĝiris je ____________________ (dato)

al la sekvanta konto:
☐ Esperanto-Liga für Christen, Ev. Bank Kassel
IBAN DE20 5206 0410 0006 4349 16
BIC GENODEF1EK1

☐ UEA-konto de Rudolf Fischer: rfis-w

Rimarkigoj / proponoj:

______________________________

______________________________

**Bv. Sendi la suprajn datumojn paperpoŝte aŭ elektronike al la komisiito**



La falo de la muro. Far Raphaël Thiémard, 1989. CC BY-SA 2.0. wikimedia.commons

# Jam pasis 35 jaroj

La berlina muro aŭ simple la muro, nomita ankaŭ "kontraŭfaŝisma remparo" en propaganda lingvo de la iama Germana Demokratia Respubliko, estis parto de la interngermana limo, kiu de aŭgusto 1961 ĝis novembro 1989 dividis la okcidentan Berlinon de la orienta parto de la urbo kaj de la ĉirkaŭa tereno de la GDR. Ĝi estas unu el la plej famaj simboloj de la malvarma milito kaj de la disdivido de Germanio.

Pli ol simpla muro, la berlina muro estis fakte tuta defendokonstruaĵo kun du muroj inter kiuj malplena strio, rondirvojo, gardturoj kaj alarmsistemoj. Dum la provo transiri la severe garditan limon al okcidenta Berlino, multaj homoj estis mortigitaj. La preciza nombro de viktimoj estas ne certa – varias inter 86 kaj 238 mortintoj.

La malplifortiĝo de Sovetunio kaj la politiko de liberigo gvidata de Miĥail Gorbaĉov ebligis al la orientgermanoj per impulso faligi la muron de la honto la 9an de novembro 1989. Tiu evento estis la eko de la germana reunuiĝo.

Kvankam preskaŭ tute detruita, la muro restas memorloko al kiu pluraj muzeoj estas dediĉitaj. La cikatroj, kiun ĝi lasis en la urba organizo de la nova germana ĉefurbo, ankoraŭ ne estas neniigitaj. La berlina muro daŭre ludas gravan rolon en la germana fikcio, eĉ okcidenta, kiel atestas multaj libroj kaj filmoj.

El Vikipedio

La berlina muro ĉe Bethaniendamm, 1986.
Far Noir, CC BY-SA 3.0, wikimedia.commons



Memorloko por la mortintoj. Far Magnus Manske.
CC BY-SA 3.0, wikimedia.commons



# Kiel sian bebon mame nutras patrino

(originale verkita en Esperanto)

M: JAHR UND TAG DIE FISCHER KNÜPFEN IHRE NETZE




2. Dio estas am'. Kaj tiu am' sin vidigis,
batas en Jesuo, blovas en la Spirito.
Se ni en la amo konstante vivas,
ni vivas en Dio, vivas Di' en ni.

KIEL SIAN BEBON MAME NUTRAS PATRINO • M (Jahr und Tag): Josef Stemmrich (1917 - 2004) • der köcher, vol. 1, p. 50-51, el: Die neue Fahrt, Freiburg 1952 • © Copyright control • E (originale verkita): Albrecht Kronenberger 2022-03-29

↑ Psa 22,10 • Psa 71,6 • 1 Joh 4,16

*La dua ripetado estas libervola.*